

Aida Čižikaitė
(Vilnius universitato Kaunas humanisma fakultato, Litovio)

Parma, 2006-07-27

Poliglotoj — produkto de multlingva medio

Demandoj pri kapabloj por lingvoj publikan opinion altiras pro du kialoj. Unua: regi fremdan lingvon estas unu el la plej ĉiutagaj postuloj de la vivo. Dua: regado de la lingvo en *pli alta nivelo ol multaj atingis* gvidas homon al siaspeca mondo. Al tiu mondo kaŝe rigardi ŝatas ankaŭ tiuj, kiuj restis aliflanke de barilo. Poliglotoj ĉiam emociigis esprimopovon de samtempuloj kaj postaj generacioj. Legendoj pri ili disvastiĝis el unu generacio al la alia. Tamen, ili ne ĉiam donas objektivan bildon pri tio, kiom da kaj kiujn lingvojn konis pli frue vivintaj lingvistoj.

Do, ĉu ĉiu povas lerni dek lingvojn kaj iĝi poligloto? La poliglotoj mem asertas, ke homo povas libere uzi 20–25 lingvojn kaj dum tuta vivo ellerni eĉ ĝis kvardek. Eble ili pravas, tamen kiom da klopodoj kaj tempo tio postulus. Homo ja ne povas tutan vivon dediĉi nur al lingvolernado. Sendube, oni devas lerni lingvojn, tamen regado de kelkaj lingvoj ne solvas komunikadan lingvan problemon. Kaj poliglotoj estis, estas kaj restos rara fenomeno ĝuste pro tio mirigante plejmulton.